GISTO, jul, 2007
G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

7777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777777

SOLIDARECO

Gisto-legantoj estas maturaj homoj, tial forlaseblas predikadoj, ke solidaj asocioj nur ekzistas kiam la pensoj de chiuj anoj celas saman objektivon: prosperigo de nia gaùcha E-movado. Domagxe tio ne okazas, unue manke de Realoj en chies posxo, due pro restajxoj de fiero aù egoismo en la koro de multaj el ni. Konvinkas min, ke nia Verda Kafo farigxis tradicia char neniu sxuldas asociajn kotizojn, chipajn por GEA-anoj sed enuiga afero. – Laù ne-skribita regularo chiu VK-ano pagas nur tion kion li/sxi mendis kaj konsumis. – Ankoraù pli pri solidareco: mi kontentas kiam nia amikaro reagas al la faritaj sugestoj/petoj. Tiukampe kalkuleblas la atenton de Cezar kiu ensendis sian opinion ril. al esperantigo de anglalingvaj vortoj popularigxintaj en la nacia lingvo; Ennio (Torres), kiu kolektis kaj ensendis bonajn anekdotojn trovitajn en periodajxoj; Vi legos fine de chi-Gisto. Zaghetto(POA) kaj Arno el Arojo Bonito same atentas.

PROVLEGO

Al la geZaghettoj mi dankas la helpon kaj redonon de unu chapitro prezentita al ili. Mi jam ensxovis la korektojn en la tekston definitivan. Surprizis min la fakto ke, malgraù plejzorga tajpado, ensxteligxis tiom da neglatajxoj. Ech memtrompo deveninta de angla vorto trovigxis (grindi=mueli) Ne oldigxu,hi,hi, hi! Respondo al mia propono/demando, chu iu alia amiko pretas provlegi unu chapitron, neniu reagis, gxis nun, kvankam ni kalkulas pri lertaj kompanoj. Chu al ili mankas tempo aù chu mi devas proponi antaùpagon por ilia kontribuo?

KLERECA OLIMPIADO

Malgraù manko de aktivemo de nia kolegaro, mi riskas demandi, chu bonvenos, pere de Gisto, eta demandaro pri gxeneralaj scioj de niaj geamikoj, ekzemple: dum librolegado vi trovas la vorton KOHIMURO. Pri kio gxi tuj pensigas vin? Kaj KALEMBURO? kaj chi tiu, KOLAZIONO? Jen plia: kiel diri “BATATA DOCE”? (angle, sweet potato), sen konsulti vortaron? Solvo okazu dum la VK. – Por igi la konkurson vere interesa, bonvenus ke iu fondus etan rekompencon, por ne paroli pri premio.

NE FORGESU!

Ju pli via charmo evitas plezurigi la VK-amikojn per via foresto, des pli vi perfidas la solidarecon, des pli vi sxuldas al la magra kaso, por la Gisto-pretigado kaj la posxtaj afrankoj. Ne forgesu!

GRAVA AVERTO

Se vi pagas per ELECTRO-karto (aù alia), estu tre atenta. Kontrolu tion kion montras la aparato. Estas uloj komisiitaj, chefe en benzinvendejoj, trompi klientojn. Kiam ili etendas la elektronan aparaton viadirekten, por ke vi tajpu vian identigan numeron, ili per la fingroj kovras parton de la ekraneto, por ke vi ne vidu ilian artifikon. Poste ili petas ke vi ripetu, pro okazinta mistajpo, nun por enskribi la gxustan valoron de la acheto!

– Averto veninta per Internet.- Rimarku la rafinitan ruzecon de la krima organizajxo kiu, laù onidiroj, pagas procentajxojn por la servistoj de servostacioj!!

DOLCHA DANGXERO

Sciencista skipo, per Internet, sciigas, ke la populara dolchiga rimedo nacilingve nomata ZEROKAL, pere de la metabolismo estigas sedimentojn sur la okula retino. El tio rezultas lanta perdo de vidokapablo, sxajne ne kuracebla. – Mia edzino uzis Zerokal de du jaroj. Sxiaj okuloj kontinue malbnigxas. Jen tasko por chiuj ni: observi chu tio vere okazas al aliaj homoj kiuj sxangxis sukeron kontraù la noca likvajxo, preskaù chiuj, por ne dikigxi.

KONTRIBUO

Chimonate helpis min nia diligenta samideano Ennio, el Kampo Bonito, plensxtopi nian Gisto per kelkaj legindaj anekdotoj, kiujn li trovis kaj malavare proponas al niaj kafrondanoj. Infre vi legos kaj certe gxoje ridetos.

BEDAÚRO

Denove pasis monato kaj neniu kuragxis gxojigi min per tuta tago da babilado en Kaiurbo. Eble chiuj timas moskitojn sed vintre estas pokaj aù eble chiuj konsideras sin perfektaj E-parolistoj kaj fordankas mian proponon eluzi cirkonstancojn de la chiutaga vivo dum mi okupigxas. Mi ne chesos fari miajn taskojn chirkaù la domo krom la tempo kiam oni bufedos kune.

VALORA LEGAJXO

Recenzoj proponas al ni instruivajn tekstojn far veteranaj esperantistoj. Ili enhavas tre interesajn vortkunmetojn kun la celo esprimi rafinitajn nuancojn, per kiuj oni multe lernas. Se al vi mankas legolibro, ne forgesu: vortaro tenas vin agrable atenta dum longa tempo.

BALOTADO

Okazis la 21ªn, 07/07 en la GEA-sidejo je la 15,30h. por la estraro 2007/2009. aplaudo de chiuj cheestantoj lalidigis la kandidatojn. Gaja Haveno, far Cezar, mencios la nomliston kaj komentos gravan eron pritraktitan.. Eble la BKE jxus okazinta en RIO pravigas la foreston de granda nombro el nia gaúcha E-movado tamen ne kredeblas ke chiuj kongresis en RIO kaj postrestis ie survoje heimen, aù ke mankis sciigo. Domagxo!

KONKURSO

Kiu el nia VK-komunumo unue parkerigos rimaron/poezion sufiche longan kaj lerte deklamos gxin dum la finaj minutoj de VK, de mi gajnos 20 spesmilojn. – Manke de pliaj kompanoj kiuj provizas sin per interesa kaj/aù gaja teksto, por prezenti gxin, mi sentas min devigata proponi chi pagitan konkurson. Kiu vere amas Esperanton ne pridemandos, kiom valoras la proponita premio, agas tuj.

BONHUMORA-aldono.

LAÚDO

En la maldunga atesto por nia servistino mi skribis, ke sxi estas malpura, maldiligenta kaj impertinenta, tamen mi volas atesti ankaù ion bonan.

Edzo – Skribu do, ke sxi havas bonan apetiton.

INA KAPRICO

Mi butikumas cele acheti paron da belaj gantoj por mia edzino okaze de sxia datreveno.

- Je via servo, sinjoro... kiun numeron, kiun koloron, chu el ledo aù el silko, vi deziras?
- Tute egale! Morgaù mia edzino venos sxangxi ilin.

TRO GRANDA POSTULO

- For! Al sanaj kaj fortaj homoj kiel vi, mi almozon ne donas.
- Kiel vi volas. Pro viaj kelkaj grosxoj mi miajn piedojn ne rompos.

SEN-AÙTORA

- Iu sxtelis chiujn miajn kreditkartojn sed mi ne informos la Policon pri tio, char la sxtelisto elspezas malpli ol mia ezino.